



Gvidilo

tra

Bialystok

la nask-urbo de nia Majstro.



1923.

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“ Horrem
b. Köln (Germ.).



Preso: T. & H. Jung, Horrem b. Köln, Germanlando.



94(438)matystol 913(438)bia-
Dyktak (036) = 922. Paj

ANTAŬPAROLO.

Bialystok, kie nia Majstro naskiĝis kaj pasigis sian plej fruan junecon, kie kreiĝis lia verko, estas ankoraŭ malmulte konata al la Esperantistoj, ĉar ĝis nun mankis tiu-cela konigilo.

Servi al ĉiu samideano kiel informilo pri Bialystok kaj al ĉiu vizitanto kiel gvidilo tra tiu ĉi urbo — jen tasko, kiun plenumu nia broŝuro.


„Esperanto Triumfonta“.



Białystok (elp. Bjaŭistok) kuŝas je 53.08° de norda latitudo kaj 23.09° de okcidenta longitudo laŭ Grinviĉ, 134 metrojn alte super la maro. Ĝi estas grava fervoja punkto, ĉar ĝin trairas diversaj fervojaj linioj: al Varsovio, Grodno, Vilno, Baranoviĉe, Grajevo. Ĝia nomo signifas „la defluo de la Blanka (Biała)*“. Tiu „Biała“ estas malgranda rivereto, trafluanta la mezon de la urbo. La vizitantojn de Białystok ĉiam mirigas, ke la „Blanka“ en efektiveco estas tre „malblanka“, malpura rivereto. Malnova legendo rakontas tamen, ke iam „Biała“ estis ankaŭ blanka kaj larĝa rivero, sed ĉar en ĝi dronis la tiama białystoka princo, tial la pryncedzino malbenis la Biała'n, ekkriante: „Ho rivero Blanka, vi nigriĝu, via elfluo mallarĝiĝu kiel fingro!“ De tiu tempo laŭ la diroj de la legendo, la rivero nigriĝis kaj mallarĝiĝis, kaj tia ĝi aspektas ankaŭ nun.


Białystok estis fondita kiel vilaĝo en la jaro 1320 de la fama fondinto de Vilno, la litova princo Gedimin (regis 1316—1341). En Februaro de la jaro 1386 la litova princo Jagello edziĝis kun la heredantino de la pola trono, Jadviga, kaj akceptinte tial ankaŭ la titolon de „pola reĝo“, kunigis Litovujon kun Polujo. Sed la vilaĝon Białystok kaj aliajn lokojn li ankoraŭ en la jaro 1384 donacis al sia ribelanta kuzo Vitold (alie nomata Vitovt), kiun li poste en la jaro 1392 nomis „grand-princo de Litovujo“.

*) En la historiaj dokumentoj de XV-a jarcento Białystok estas nomata „Bielŝĉany Stok.“



Ĝenerala vidaĵo de Białystok.

En la jaro 1401 okazis la kunigo de Litovujo kun Polujo, kaj en la jaro 1569 la kunigo de tuta Litovujo, Prusujo kaj Latvujo kun Polujo, sekve de kio ankaŭ Białystok ekapartenis al Polujo. La lasta reĝo el la idoj de Jagello, Jan Kazimir (1648—1669) donacis en la jaro 1661 la vilaĝon Białystok kune kun la aliaj ĉirkaŭaj vilaĝoj al la pola duko Stefano Czarnecki (Ĉarnecki naskiĝis 1599, mortis 1665), post kies morto ĝin ricevis lia nepo Klemens Branicki. Branicki enloĝiĝis en Białystok, konstruigis en la jaro 1703 belegan palacon, ekzistantan ĝis nun kaj faris el Białystok urbon. En 1749, dum la regado de la reĝo Augusto III., ĝi estis oficiale nomita urbo. En la jaro 1771 Branicki mortis kaj la urbon laŭ lia testamento ricevis duko Joahimo Potocki, kaj post ties morto la dukoj Felikso kaj Johano Potocki. Dum la tria divido de Polujo en 1795 Białystok estis enkorpigita en Prusujon, kies reĝo Frideriko Vilhelmo aĉetis ĝin ĉe la dukoj Potocki por 207 970 taleroj. De 1795 ĝis 1807 Białystok restadis sub prusa administrado kaj formis provincon „Nova-Orientprusujo“ („Neu-Ost-Preussen“). En la jaro 1807 laŭ la „Tilzita paco“, okazinta en Tilzito (Tilsit) inter Napoleono, Frideriko Vilhelmo kaj la rusa imperiestro Aleksandro I. la białystoka regiono estis aligita al Rusujo. En 1812 Białystok estis nelongan tempon okupata de la franca armeo de Napoleono la Granda. En Białystok oni formis tiam „Provizoran Registaron de Grandduklando Litova“. Sed jam la 14. de dec. 1812 la franca armeo forlasis la urbon kaj ĝin reokupis la rusoj. La Viena Kongreso de 1815 konfirmis la aligon de Białystok al Rusujo. De tiu tempo Białystok formis parton de la „Nord-Occidenta Regiono“, t. e. Litovujo en la limoj de la Rusa Im-



BIALYSTOK, KATHOLISCHE KIRCHE
БѢЛОСТОКЪ, ПОЛЬСКІЙ КОСТЕЛЪ.

Katolika preĝejo en Białystok.

perio. Post la komenco de la eŭropa milito ĝin la 26. de aŭgusto 1915 okupis la germanoj, administris ĝin kaj fariis el ĝi en la jaro 1917 administran centron de la „militista administrado de Suda Litovujo“ („Militär-Verwaltung Litauen-Süd“) kaj restis en ĝi ĝis la 19. de februaro 1919. La 19. de februaro 1919 laŭ interkonsento inter la germana okupacia armeo kaj la pola generala stabo la urbon okupis la pola armeo. La 8. de decembro 1919 la „Plej supera Konsilantaro“ difinis la provizoran okcidentan limon de Polujo, laŭ kiu Białystok estis apartenonta al Polujo. La 28. de julio 1920 dum la pol-rusa milito ĝi estis okupita de la rusa ruĝa armeo kaj la 30. de julio proklamita kiel „provizora ĉefurbo de Ruĝa Polujo“. Tamen jam la 22. de aŭgusto de la sama jaro la pola armeo reokupis la urbon kaj la packontrakto inter Polujo kaj Rusujo farita en Riga en 1921. ree konfirmis la apartenecon de Białystok al Polujo.

La urbo mem havas relative malmulte da eksteraj rememoraĵoj pri la historia kresko de la urbo. Al tiuj malmultaj historiaĵoj apartenas antaŭ ĉio la supre jam menciita „palaco de Branicki“, kiu konsistas el tri konstruaĵoj, ĉirkaŭitaj de grandega parko. Antaŭe la parko de la palaco estis kunigita ankaŭ kun la nuna „urba arbaro“, kie tiam estis menaĝerio. Eĉ nun tiu arbaro estas nomata „zwierzyniec“ („menaĝerio“). Depost 1841 ĉiuj artobjektoj el la palaco estis forveturigitaj Petersburg'on kaj en la palaco mem estis aranĝita „Instituto de Nikolao I por nobelaj fraŭlinoj“ t. e. fermita edukejo-lernejo por filinoj de rusaj nobeloj. Dum la germana okupacio 1915—1919 la palacon okupis antaŭe la germana stabo („Ober-Ost“ kaj poste la germana milita administrado de



BIALYSTOK, RUSSISCHE KIRCHE
БѢЛОСТОКЪ, РУССКІЙ СОБОРЪ.

Rusa preĝejo en Białystok.


Suda Litovujo. Nun tiun palacon okupas la administrado de Białystok'a „vojevoda regiono“ (t. e. gubernio).

El aliaj historiaj konstruaĵoj estas notinda la domo je la strato Kilinskiego (antaŭe Germana) n-o 16. Ĝi estas konstruita de itala arĥitekturo kaj estis dum la vivo de Branicki verŝajne teatro. En la supra etaĝo de tiu domo estas ankoraŭ nun granda salono kun restoj de galerio. Aliaj famoj diras, ke tie iam estis masona loĝio. Krom tio, tiu domo estas interesa ankaŭ pro tio, ke Napoleono dum sia remarŝo el Moskvo estinte en Białystok tranoktis en ĝi.

Interesa estas ankaŭ la malgranda katolika preĝejo je la sama strato, lignkonstruita jam en 1576 kaj rekonstruita en 1746 de Branicki. Kontraŭ tiu ĉi preĝejo staras la t. n. „malnova hotelo“ (antaŭe „germana hotelo“), kiu ĝis la jaro 1833 estis virina monaĥejo, pri kio atestas la pendanta ĝis nun murtabelo kun latina surskribo.

Tre originala kaj interesa konstruaĵo estas la „urba turo“, konstruita en la XVIII jarcento kiel urbodomo kaj servanta delonge al la fajrobrigado. Ĉar en la tempo, kiam tiu turo estis konstruita, ne ekzistis la telefonoj, tial la deĵoranta sur la balkono de la turo fajrobrigadisto atente observadis la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn kaj rimarkinte fumon tuj signalis al la fajrobrigado. Eĉ nuntempe malgraŭ la ekzistado de telefonoj la turo bonege servas por tiu celo.

El aliaj konstruaĵoj ni notu ankoraŭ la „realan lernejon“ (nun pola virgimnazio), kiu estas konstruita en 1804 dum la prusa adminiotrsaden Białystok laŭ la ordono de la reĝo Frideriko



Zamenhova naskodomo en Białystok (Vidaĵo de la strato).
Sur la domo oni rimarku la stratsildon „Zamenhova“.


Vilhelmo III kaj kiu interesas nin, Esperantistojn, pro tio, ke ĝi estas la „alma mater“ de nia neforgesebla Majstro.

La Esperantistojn interesas kompreneble precipe la strato kaj la domo, en kiu naskiĝis D-ro Zamenhof. Ni sukcesis antaŭ 3 jaroj konstati, ke li naskiĝis je la „verda strato“. Laŭ la peto de grupo de ĉi tieaj samideanoj, kiu estis subtenita de kelkaj kultursocietoj, la Urba Komitato de Białystok en sia kunsido de 11. de junio 1919 decidis por honorigi sian eminentan samurbanon alinomigi ĉi tiun straton „Zamenhova strato“. Tiu ĉi strato kuŝas en la centro de la urbo kaj deiras de la ĉefa strato Lipowa.

La domo, en kiu nia Majstro naskiĝis, troviĝas je angulo de la Zamenhova kaj Brudna („malpura“) stratoj. Tio estas malnova ligna domo kun sufiĉe interesa arkitekturo. Ligna kovrita ŝtuparo kondukas al la supra etaĝo en la loĝejon, kie naskiĝis la Majstro. La loĝejo mem estas tre mizera kaj malgranda. Ĝi konsistas el tri etaj ĉambroj. La domo mem restis ĝis nun en la sama stato, en kiu ĝi estis, kiam naskiĝis la Majstro.

La intenco de Białystokaj samideanoj alnajligi al tiu domo marmoran memortabulon bedaŭrinde ne povis pro diversaj kaŭzoj ĝis nun esti efektivigita. Krom donacoj de białystokaj Esperantistoj ni ricevis por tiu celo dum la Praha Universala Kongreso tute nepetite de s-o prof. Roy tre atentindan monoferon. Nun esperinde post nelonga tempo nia intenco estos efektivigita.

Antaŭ la milito Białystok havis ĉirkaŭ 100 000 loĝantojn, nun nur 72 000. Ĝia loĝantaro konsistas, kiel oni jam scias el la „Letero pri deveno de Esperanto“ el diversaj nacioj: poloj, blankrusoj,




Zamenhofa strato en Białystok.

rusoj, hebreoj, germanoj. El ili estas 70% da hebreoj, 20% da poloj, la reston faras la diritaj aliaj nacioj.

Białystok estis antaŭ la milito grava industria centro, liveranta siajn ellaboraĵojn precipe en Rusujon kaj konkuranta eĉ kun la germanaj, francaj kaj anglaj ellaboraĵoj. La ĉefaj objektoj de la białystoka industrio estis: diversaj drapoj litkovriloj, ledoj. Krom tio estis fabrikataj maŝinoj cigaredoj, ĉapeloj, sapoj, butonoj ktp. Laŭ la oficiala rusa statistiko de la jaro 1895 en Białystok estis 230 drapfabrikoj kun 5000 laboristoj, produktantaj drapojn je $3\frac{1}{2}$ milionoj da rubloj jare. Da ledaj fabrikoj estis en Białystok en la jaro 1913 50 kun 1000 laboristoj; krom tio funkciis 3 maŝinfabrikoj, 2 cigaredfabrikoj, 2 ĉapel-fabrikoj, 3 vaffabrikoj ktp. La fabrikejoj en Białystok produktis en 1912 ĉirkaŭ 25 milionojn da brikoj.

Nun post la milito białystoka industrio jam reviviĝis, kvankam ĝi kompreneble trovas multajn malhelpojn kaŭze de la ĝenerala ekonomia situacio kaj pro la perdo de siaj antaŭmilitaj vendolokoj (Rusujo). Laŭ la nova oficiala statistiko en la jaro 1921 en Białystok funkciis 248 drapfabrikoj, 25 ledofabrikoj, 4 vaffabrikoj, 2 cigaredfabrikoj, 4 maŝinfabrikoj, 3 bierfarejoj, 2 brosfabrikoj, 33 muelejoj ktp. Entute estis en la białystoka industrio en tiu jaro okupitaj 9334 laboristoj, el kiuj 7110 en pli grandaj fabrikoj kaj 2224 en la pli malgrandaj. La pli grandaj fabrikoj estas komplete kaj moderne aranĝitaj: ekz. la cigaredfabriko „F. D. Janovski“ posedas propran kestofarejon, presejon, litografejon ktp. Ĝi produktas ĉiutage 2 milionojn da cigaredoj



kaj 2000 kilogramojn da tranĉita tabako. Nun ree funkcias en Białystok preskaŭ ĉiuj fabrikoj, funkciintaj antaŭ la milito.

En Białystok aperas nun 2 ĉiutagaj kaj 2 ĉiusemajnaj gazetoj: nome ĉiutaga pola „Dziennik Białostocki“ („Białystoka ĵurnalo“), 4—6-paĝa, aperanta de 1. de aprilo 1919; ĉiutaga hebrea „Dos naje Lebn“ („La nova vivo“), 4—8-paĝa, aperanta de februaro 1919; pola ĉiusemajna „Nowe Życie“ („La nova vivo“), popola kristan-demokratia organo, 16-paĝa, kaj rusa ĉiusemajna „Swobodnaja Mysl“ („La libera penso“), progresema organo, 4-paĝa. La hebrea „Dos naje Lebn“ kaj la pola „Dziennik Białostocki“ favore rilatas al Esperanto kaj ofte presigas pri-Esperantajn notojn.

Dum la germana okupacio en Białystok aperadis nur unu oficiala „Białystoka gazeto“ en tri lingvoj (germana, pola kaj hebrea). La aperigo de privataj gazetoj estis tiam malpermesita. Ankaŭ en tiu „Białystoka gazeto“ aperis kelkaj notoj pri Esperanto kaj ĝia aŭtoro.

En Białystok funkcias urba biblioteko (nur en pola lingvo) kaj kelkaj societaj bibliotekoj. Ekzistas ankaŭ diversaj societoj profesiaj, kulturklerigaj ktp.

La legantoj verŝajne supozas, ke en la multlingva Białystok ekzistas almenaŭ kelkdek Esperantistaj societoj. Ili do senfine miros, eksciante, ke en la naskiĝurbo de la Majstro nur en fino de 1920-a jaro fondiĝis „Zamenhofa Esperantista Societo“, kiu devis batali kun diversaj aliloke tute superfluaj baroj kaj kiu nur en novembro de la jaro



1922-a estis oficiale konfirmita. Tiel Białystokaj samideanoj, kies nombro feliĉe ĉiam plimultiĝas, praktike spertas la verecon de la malnova proverbo: „Neniu estas profeto en sia patrolando“.

J. Šapiro, E. L. A.,
ekssekretario de la urbo Białystok.



Historiaj Dokumentoj.

(Unuafoje publikigataj.)

I. La naskiĝo de la Majstro.

Traduko.

Paĝo 24. Libro por enskribo de naskiĝintaj hebreoj en la jaro 1859.*)

N-o virina		Kiu faris la cirkuŝidon	Dato kaj monato de nask. k. cirkuŝido		Kie naskiĝis	Profesio de patro, nomoj de gepatroj	Kiu naskiĝis kaj kian nomon li ricevis
			Kristana	Hebrea			
—	47	Lejb Kon Volf Suraski	Decembro.	3 10 26-19	En Białystok	Mordka, filo de Fejwel Zamenov**) Libe, filino de Ŝolem Sofer	filo Lejzer***)

Parto I. — Pri naskiĝintoj.

Rimarkoj:

*) La libro estas presita kaj notita laŭ la rusa leĝo en 2 lingvoj: rusa kaj antikve-hebrea. Ĝi troviĝas en la arĥivejo de Hebrea Komunumo en Białystok.

**) En la rusa teksto estas notita „Zamenov“, en la hebrea „Zamenof“. Ĝuste devus esti notite ruse „Zamengof“, ĉar „h“ estas ruse skribata „g“.

***) Hebrea nomo de „Lazarus“.

II. Zamenhova strato. Traduko el pola lingvo.

Protokolo N-o 22

de la kunsido de Provizora Urba Komitato de la urbo Białystok, la 11-an de Junio 1919-a j.

§ 20.

Peto de Esperantistoj kaj adeptoj de D-ro Zamenhof.

La petantoj en sia skribaĵo petas pri nomigo de unu el la stratoj de la urbo „strato de Zamenhof“, kiu naskiĝis ĉi tie.

La Komitato, favorante la peton, decidas nomi la straton Zielona alie Jatkowa „strato de Zamenhof“ (en originalo: „ulica Zamenhova“).



Gvidilo tra Białystok.

Esperantistaj adresoj.

Delegito de UEA, s-o J. Ŝapiro, str. Lipowa 33.
Virinoj povas sin turni al f-ino J. Knaup, str. Palacowa 2.

Junuloj al s-o L. Hepner, Kilińskiego 4, aŭ al s-o I. Ŝpiro, Sienkiewicza 40.

Zamenhova Esperantista Societo — kunvenejo kaj aliaj detaloj ekscieblaj ĉe la suprecititaj gesinjoroj.

Oficialaj institucioj.

Województwo (elp.: vojevuctvo) — administrejo de Białystoka regiono, ampleksanta 15 distriktojn — str. Kilińskiego, palaco de Branicki.

Starostwo (elp.: starostvo) — administrejo de Białystoka distrikto — str. Sienkiewicza (= Sjenkjeviĉa) 28.

Policejo urba kaj distrikta — str. Warszawska (= Varŝavska) n-o 3

Policajkomisariejoj urbaj („komisarjat policji“)

I-a distrikto — str. Lipowa 42,

II-a distrikto — Koszykowa (= Koŝikova) 2,

III-a distrikto — Mickiewicza (= Mickjeviĉa) n-o 21,

IV-a distrikto — Grunwaldska 42.

Magistrato (magistrat) — str. Warszawska 21.

Poŝtoficejo („poczta“ — poŝta)

1. ĉe la stacidomo — malfermita ĉiutage de 9-a ĝis 13-a kaj de 16-a ĝis 18-a, dimanĉe de 9-a ĝis 11-a,
2. str. Kościelna 10 — malfermita ĉiutage de 9-a ĝis 15-a, dimanĉe de 9-a ĝis 11-a.

Poŝtrestantaj leteroj estas riceveblaj nur en la poŝtoficejo je str. Kościelna 10.

Telegrafoficejo („telegraf“)

1. ĉe la stacidomo — malfermita ĉiutage de 9-a ĝis 13-a kaj de 16-a ĝis 18-a, dimanĉe de 9-a ĝis 11-a,
2. str. Kościelna 10, supra etaĝo — malfermita ĉiam.

Telefona parolejo publika („telefoniczna rozmównica publiczna“ = „telefoniĉna rozmuvnica publiĉna“) — str. Kościelna 10, supra etaĝo, en la ejo de la telegrafoficejo.

Fajrobrigadejo („straż ogniowa“ — „straż ogniowa“)

1. urba („miejska“) — str. Warszawska 3,
2. volontula („ochotnicza“ — „oĥotniĉa“) — str. Lipowa 52.

Registra oficejo („biuro meldunkowe“ — „bjuro meldunkove“), kie devas sin registrigi ĉiuj al- kaj forveturantoj — str. Warszawska 21, en la Magistrato.

Hoteloj.

- „Ryc“, str. Kilińskiego 2.
- „Ostrowski“, str. Sienkiewicza 15.
- „Stary“, str. Rynek Kościuszki.

- „Bristol“, str. Lipowa 15.
- „Wiktorja“, str. Sienkiewicza 3.
- „Warszawski“, str. Kolejowa 14.
- „Metropol“, str. Lipowa 52.
- „Palast“, str. Lipowa 27.

Restoracioj.

Stacidoma, en la atendejo de I-a kl.

- „Ryc“, str. Kilińskiego 2.
- „Aquarium“, str. Rynek Kościuszki.
- „Empire“, str. Sienkiewicza 14.
- „Lubczyński“, str. Rynek Kościuszki 1.

Sukeraĵejoj — Kafejoj.

- „Metz“, str. Sienkiewicza 4.
 - „Empire“, str. Sienkiewicza 14.
 - „Lubczyński“, str. Rynek Kościuszki 1.
- Krom tiuj estas multaj duarangaj.

Bankoj.

- Regna Banko („Polska Krajowa Kasa Pożyczkowa“) — str. Warszawska 14.
- Bank dla Handlu i Przemysłu (Banko por Komerco kaj Industrio) — str. Warszawska 1.
- Bank Handlowy (Komerca Banko) — str. Sienkiewicza 22.
- Bank Przemysłowy Warszawski (Varsovia Industria Banko) — str. Sienkiewicza 40.
- Polski Bank Komercyjny (Pola Komerca Banko) — str. Warszawska 19.
- Bank Związków Ziemian (Banko de Unuiĝo de Bienposedantoj) — str. Warszawska 9.

Bank Kredytowy Warszawski (Varsovia Kredita Banko) — str. Warszawska 5.

Białostocki Bank Przemysłowo-Handlowy (Bialistoka Banko Industri-Komerca) — str. Kilińskiego 23.

Preĝejoj.

Katolika — str. Rynek Kościuszki.

Luterana — str. Warszawska.

Grek-ortodoksa — str. Lipowa.

Hebrea — str. Szkolna (Ŝkolna).

„ — str. Żydowska (Ĵidovska).

Religiaj komunumoj.

Katolika — ĉe la preĝejo.

Luterana — ĉe la preĝejo.

Grek-ortodoksa — ĉe la preĝejo.

Hebrea — str. Lipowa 41.

Malsanulejoj.

Szpital miejski (ŝpital miejski — urba malsanulejo) — str. Lipowa 43.

Szpital zakaźny (Epidemia malsanulejo) — str. Zwierzyniec.

Szpital Żydowski (Hebrea malsanulejo) — str. Warszawska 15.

Szpital Św. Łazarza (Malsanulejo de S-ta Lazaro — venera) — str. Św. Rocha.

Szpital Położniczy (ŝpital poŝojniĉi — akuŝa malsanulejo) — str. Kraszewskiego (Kraŝevskiego) 1.

Apotekoj.

Societaj:

por malriĉuloj — de la S-to „Linus Hejlim“ — str. Różanska (Rujanska) 3.

Privataj:

de Ajzensztat — str. Rynek Kościuszki 11.

de Gessner — str. Lipowa 18.

de Filipowicz — str. Sienkiewicza 2.

de Franszteter — str. Sienkiewicza 59.

de Hermanowski — str. Warszawska 20.

de Kuzycki — str. Sienkiewicza 34.

de Wilbuszewicz — str. Rynek Kościuszki n-o 15.

Teatro.

„Palast“ — str. Kilińskiego.

Kinematografoj.

„Apollo“ — str. Sienkiewicza 22.

„Modern“ — str. Lipowa 20.

„Rusałka“ — str. Lipowa 18.

Bibliotekoj.

Urba — „Biblioteka Miejska“ — str. Rynek Kościuszki 1.

Privata de Hebrea Kultur-Kleriga Societo „Biblioteka Żydowskiego Stowarzyszenia (legustovajiŝenia) Kulturalno-Oŝwiatowego“ — str. Sienkiewicza 36.

Aŭtomobilfiakroj

estas lueblaj je angulo de str. Lipowa kaj Sienkiewicza. Oni antaŭe interkonsentu pri la prezo!

Fiakroj

estas lueblaj en diversaj punktoj de la urbo; oni postulu la oficialan tarifon kaj pagu laŭ ĝi.

Esperanto Triumfonta

estas havebla

en la librejo de Kahan, Sienkiewicza 5,
ĉe la Delegito de UEA kaj
en Zamenhofa Esperantista Societo.



Fabriko de
tabak-ellaboraĵoj

F.D. JANOWSKI

BIALYSTOK

Telefono 201.



ESPERANTA LIBROTREZORO

Kolekto da legindaj, zorge elektitaj, nur originalaj Esperantaj literaturajoj.

Ĝis nun aperis:

N-o 1. *J. Ŝapiro (Joŝo)*: Babiladoj de bonhumora Zamenhofano. Rekomendita de Esp. Lit. As. Kun ilustraĵoj. 42 pĝ. k. kovrilo.

N-o 2. *M. L. Kaplan*: Akordoj Esperantaj. 32 paĝoj kaj kovrilo.

La kolekto estas daŭrigota.

Mendu ĉe:

Pola Esperanto Servo (Fr. Drengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz (Polujo),
J. Ŝapiro, Lipowa 33, Białystok (Polujo),
aŭ en via Esperanta Librejo.

Fabriko de drapoj kaj litkovriloj

I. Ŝpiro

en Białystok, Łąkowa 4.

Oficejo: Białystok, Sienkiewicza 42.

Telefonoj: 175, 12a kaj 12b.

Korespondado en la lingvoj: angla, franca, germana, pola, rusa kaj Esperanta.

Biblioteko

je nomo de „Ŝalom-Alejhem“ ĉe
Białystoka Hebrea Kulturkleriga Societo

Białystok, str. Sienkiewicza 36 posedas librojn en la lingvoj juda, hebrea, pola, Esperanta, rusa, germana, franca.

Ĉirkaŭ 20 000 libroj. — La biblioteko kolektas materialojn por histori-etnografia fakoj.

Bonvolaj librodonaĵoj estas petataj je adreso:
Biblioteka Żyd. Stow. Kulturalno-Oświatowego, Sienkiewicza 36,
Białystok.

APOTEKA KAJ KOSMETIKA VENDEJO

Posedanto: J. Serlin, UEA-ano „UNION“ Białystok, Rynek Kościuszki 22

rekomendas ĉiuspecajn patentitajn kuracilojn kaj grandegan elekton da kosmetikaĵoj. Prezoj moderaj kaj fiksjaj. Solida servado. — Esperanto parolata.



ELEKTRA RAPIDPRESEJO »VIKTORIA«
TRUNKOVSKI KAJ TALINSKI, BIALYSTOK, LIPOVA 21

Postulu prez-
proponojn!

Presado en
ĉiuj eŭropaj
lingvoj.

Esperanto ko-
respondata!

Komerca Domo
Kahan & Agurtin

Białystok, Lipowa 33

Telefona 313

Anglaj drapoj kaj lano

Esperanto korespondata.

Ĝus aperis necesa por propagando kaj kursoj:

Kompletny podręcznik

języka międzynarodowego — Esperanto.

Verkita de *Leo Turno*. — 72-paĝa kun antaŭparolo
de Bronisław Kuhl. — La prezo 400 pol. mk. — Al
mendantoj de alm. 25 ekz. konvena rabato.

Ricevebla nur post antaŭa pago. — Postulu pŝkasan transpagilon.

Leon Schleichkorn, Kraków, Polujo, Długa 15.

Farejo de kaŭĉukaj kaj metalaj stampiloj
L. Kofman, Lipowa 13, Białystok.
Esperanta korespondata.

TA-
RO
OF.

uksa pa-
rig. fotoj.

DE
LO.

. De la
ukita de
komend-
Asocio.

ONI RIDAS.

Bela kolekto de veraj perloj de
bonhumoro kaj sprito. De s-ano *O.*
Rieck. Rekomendita de Esperantista
Literatura Asocio kaj revizita de
Zanoni, literatura redaktoro de ET.

La prezojn demandu ĉe la eldonejo
Butin & Jung, Godesberg, Germanl.

Gvidilo tra
Bia lysteok



LA LASTALTA
GOLDE-B-RO
ZAMENH
TABLERO
MILAPRO

10.



(Szapiro
Guidilo tra

Esp.

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-BG-0503127